

La lastaj vortoj

Vi legas nun la lastan numeron de Eventoj... Tiu frazo por ni estas malĝoja - ja finiĝas iu pli ol 10-jara sukcesa projekto, aliflanke tamen ĝi estas ankaŭ ĝoja, ĉar ĝi signas la komencon de novaj taskoj, novaj projektoj.

Antaŭ 11 jaroj ni entreprenis realigi "la plej oftan Esperantan gazeton". Rapide Eventoj iĝis ne nur internacie konata, sed ankaŭ eĉ rekonata kaj prestiĝa.

Kiom kaj kiuj?

La kvanto de abonantoj variis inter 1000 kaj 1500 el 60-72 landoj. La 1-a numero aperis la 2-an de marto en 1992, kaj poste en ĉiu dua semajno. Estas apenaŭ kredeble, ke en la entute 244 numeroj ni aperigis pli ol 1970 paĝojn, kaj tajpis 13,1 milionojn da literoj ... !

La redaktadon de la gazeto prizorgis pluraj homoj. Zorgis pri ĝi krom mi Sándor Hideg (la unuaj numeroj), Nikolaj Gudskov (staĝinto el Moskvo, 2 jarojn),

daŭrigo sur p. 2.



Agrablajn jarfinajn festojn!

FAKA LITERATURO EN ESPERANTO

Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko: STEB


Lingvon oni lernas por utiligi ĝin. La utuligo en fakaj terenoj tamen estas pli komplika ol la ĉiutaga konversacio. Ĝi postulas ne nur fakajn partnerojn, organizaĵojn, sed ankaŭ terminarojn kaj fakajn tekstojn.

Se oni volas uzi la lingvon en fakaj aferoj aŭ volas verki, traduki fakajn tekstojn, anticipi oni devas ekkoni la koncernajn fakajn terminojn. Ĝuste en tiu tereno volas helpi nia projekto, la virtuala biblioteko Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko, STEB.

La projekto havas 4 branĉojn:

Hiperligoj

Ni "ĉasas", t.e. kolektas diversajn retpaĝojn (ttt-paĝojn) kun faka literaturo dise en interreto, kaj faras hiperligojn al ili.



Re-disponigo, rekomputiligo

En nia historio jam estis eldonitaj plurcent vortaroj, studoj, libroj artikoloj kun faka enhavo, sed 99 %-oj de ili ne plu estas akireblaj. Necesas skani aŭ retajpi, kaj ree disponigi ilin en interreto por utiligo. Tio estas ege grava, ĉar eĉ se la malnovaj verkoj eble jam ne plu estas aktualaj, la terminaroj, esprimoj estas tre utilaj por nunaj fakuloj.

Se iu NUN volus verki artikolon kun moderna enhavo, li ne devas "re-eltrovi la varman akvon", t.e. ne devas mem eltrovi ĉiujn terminojn, sed devas esplori la jam faritan laboron de aliaj personoj.

Post la rekomputiligo de malnovaj materialoj ni deponas ilin en interreto ĉu en html-, ĉu en alia populara formato.

Novaj materialoj

Se iu nun verkas fakan mate-

rialon, ni helpas pri ĝia utiligo kaj atingeblo. Oni povas alŝuti ilin al interreto (kaj ni faras ligan al tiu retejo), aŭ oni povas alsendi ilin al ni, kaj ni mem deponos ilin en nia interreta servilo ĉe Eventoj.

Neeldonitaj manuskriptoj

Ofte kiel rezulto de plurjara laboro ekzistas plurdekoj da diversaj manuskriptoj de fervoraj esperantistoj, kiuj ne trovis eldonejon por aperigi siajn fakverkojn. Tre ofte ili perdiĝas,

ĉefe post la morto de niaj samideanoj. Por savi kaj utiligi ilin, en

KAEST-2002 (Konferenco pri Aplikado de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, Dobrichovice, Ĉeĥio) ni anoncis nian pretecon servi kiel kolektejo de tiuj manuskriptoj. Oni do povas perpoŝte sendi ilin al nia adreso, kaj ni aŭ deponos ilin por posta utiligo aŭ ni enkomputiligos ilin - en ritmo de niaj laborkapacitoj. Nia adreso: Eventoj, pk. 87, HU-1675 Budapest, Hungario.

Branĉoj, fakoj, formatoj

La pretajn materialojn ni disponigos laŭ apartaj fakoj. Ni klopodas sekvi la sistemon de UDK (Universala Decimala Kod-sistemo) de bibliotekoj - tamen ni ne estas rigoraj en la prijuĝo.

Se ni havos plurajn materialojn en iu nova fako, ni malfermos apartan ĉambron (dosierujon) aŭ subĉambron por ili - depende de la kvanto de la havataj fakaj materialoj.

Por koncentri la fortojn, en la komenco ni kolektas fakajn materialojn unuavice en la kampo de t.n. realaj sciencoj (teknikaj fakoj).

daŭrigo sur p. 3.

LA LASTAJ VORTOJ

daŭrigo de p. 1.

Abdurahman Junusov (staĝinto el Mahačkala 1,5 jarojn), Radácsi László (1,5 monatojn) kaj fine Axel Ország-Krysz (3,5 jarojn). Krom la redaktaj laboroj kompreneble estis amasego de aliaj kasistaj kaj administrativaj taskoj, pri kiuj zorgis ĉefe István Mészáros (8 jarojn). Pro la solvo dum la tuta periodo de la librotenaj kaj financaj taskoj ni estas dankaj al Zsuzsanna Virág.

Servoj

La profilo de Eventoj estis klara: novaĵoj el Esperantujo, kun aparta atento al la faka aplikado kaj al la ebloj utiligi la lingvoscion.

Krom aperigi la novaj-artikolojn, ni klopodis helpi la Esperantan komunumon ankaŭ per diversaj servoj: aktualaj adresaroj kaj listoj (ekz. de Esperantaj gazetoj kaj redakcioj, radiostacioj, videofilmoj, muzik-diskoj, dissendolistoj k.a.), ni ellaboris kaj distribuis Esperantigitan tiparon por komputiloj (Win 3.1 kaj Macintosh), aperigo de specialaj fakaj suplementoj pri greftado, ŝuo- kaj vinfarado, pluraj fakaj asocioj, ktp.) memgluaj strioj por aŭtomobiloj, prizorgo de Plena Kalendaro, kaj pluraj aliaj.

Intertempe la mondo multe ŝanĝiĝis. El simpla redakcio ni iĝis land- kaj internacnivela Esperanta centro, komencis eldonadi librojn, organizi kursojn, kaj priservi la parolantojn de la Internacia Lingvo ne nur en Hungario sed ankaŭ internacie.

Lastatempe la kvantoj de tiuj novaj taskoj jam komencis superi niajn laborfortojn. Ni devis reipensi la liston de niaj taskoj kaj determini ilian prioritaton, kaj fine ni decidis pri ĉesigo de Eventoj.

Malgranda fina venko

Malmultaj scias, ke en la lastaj 3-4 jaroj al Hungario trafis "malgranda fina venko", ja ĉiujare plurmil homoj, studentoj lernas nian lingvon por havi iun lingvoekzamenon pro ŝtata preskribo kiel kondiĉo por ricevi sian diplomon. (Temas pri pli ol 7000 studentoj nur en la jaro 2002...) Amare ni spertas,

ke post la sukcesa ekzameno ĉ. 99 elcentoj el ili forturnas sin de Esperanto, ja ne trovas nek taŭgan socian komunumon nek taŭgan utiligeblon de la lingvo.

La nova projekto

Ekde januaro do ni turnas nian atenton al nova sed tre malfacila projekto: disponigo kaj re-disponigo de faka literaturo en Esperanto. Ni invitas vin kunlabori, kunagadi en tiu sfero, ja mi estas konvinkita, ke ĝi estas esenca kondiĉo por estonto de nia afero. Detalojn pri ĝi vi trovas en la titolpaĝa artikolo.

Informado? - Plu!

Kompreneble ni ne plene forlasas la kampon de informado. Paralele al la internacia versio de Eventoj jam de pluraj jaroj aperadis ankaŭ hungarlingva suplemento, atinganta nur la hungariajn abonantojn. Tiu iama "suplemento" daŭre aperos kun la nomo Esperanta novaĵletero "Hungariaj Eventoj".

Plu funkcias ankaŭ nia interreta novaĵagentejo RET-INFO. Se vi estas kontenta pri la redakta, selektada laboro de nia teamo, ni invitas vin aliĝi al tiu servo. La abonkotizo estas nur simbola: 19 eŭroj por A-landanoj kaj nur 10 eŭroj por B-landanoj. Detalojn vi trovas en la paĝo 5.

Por ebligi la utiligon de la aperintaj artikoloj, depost unu monato ni disponigos senpage la tutan 11-jaran enhavon de Eventoj en niaj interretaj paĝoj <http://www.eventoj.hu> En tiu retejo vi trovas ankaŭ la plu aperontan "Plenan Kalendaron" de Esperanto-Aranĝoj, kaj informojn pri la novaĵagentejo RET-INFO.

Nun ni finas la historion de Eventoj. Tamen ni ne deklaras ĝian definitivan ĉeson: se la cirkonstancoj estos favoraj, eble iam ni revivigos ĝin.

Do, dankojn pro via pli ol 10-jara helpo, subteno, kunlaboro, eltenemo. Adiaŭ (aŭ eble ĝis revido!)

Multajn Esperantajn sukcesojn, kaj agrablajn jarfinajn festojn deziras al vi

László Szilvási
kaj la tuta Eventoj-teamo
<http://www.eventoj.hu>

FILMOJ

VIDEO-FESTIVALO

Al la 5-a festivalo de video-filmoj en Esperanto, organizita de la E-Societo en Maribor komence de novembro, sendis siajn filmojn aŭtoroj el Francio, Aŭstralio, Kroatio, Nederlando kaj Slovenio. En la branĉo "Artaj filmoj" la internacia ĵurio atribuis la unuan premion al la filmo "La Tukoj" de Bernard Celine (Francio). En la branĉo "dokumentaj filmoj" la ĵurio ne aljuĝis premiojn.

La 6-a video-festivalo okazos en oktobro 2003 same en Maribor.

Zlatko Tisŝljár
Rete: zlatko.tislar@siol.net

MALLONGE

Inter 08-10. 11. 2002 okazis en la Pedagogia Universitato de Karakaso, Venezuelo, la 9-a Tutlanda Renkontiĝo de la venezuelaj esperantistoj por festi la 90-jariĝon de la Venezuela Esperanto-Asocio fondita en la urbo Maturin. Por festi tiun datrevenon venis samideanoj el Kolombio, do la evento fariĝis la 1-a Venezuelo-Kolombia Esperanto-Renkontiĝo.

Zamenhof-Bankedo okazas apud San Francisco en Berkeley, Kalifornio dum la tuta posttagmezo de la 12-a de januaro 2003. Oni povas trovi detalojn.

Inter la 14-15-a de decembro 2002 okazis la 34-a Korea Kongreso de Esperanto en urbo najbare al Seulo.

Okaze de Zamenhof-Tago 2002, Kroata Esperanto-Ligo lanĉis kompaktdiskon de Vida Jerman kaj Neven Mrzlecki sub titolo "Brazilo akvarelo". La festo okazis la 16-an de dec. en Hotelo Internacional, Zagreb.

Estis organizitaj du Zamenhof-tagoj en Belgio la 15-an de decembro en Calamine kaj la 17-an de decembro en Liege.

Oszkár Princz, ĝisnuna ĉefsekretario de Hungaria Esperanto-Asocio, HEA abdikis pri lia membreco en la estraro de HEA ekde la 1-a de decembro.

FAKA APLIKADO

FAKA LITERATURO EN ESPERANTO: S.T.E.B!

daŭrigo de p. 1.

Se iu entreprenas kolektadon de fakaj materialoj en iu branĉo de t.n. "humanaj sciencoj" (lingvistiko, historio, literaturo, pedagogio ktp.), ni volonte helpas tiun agadon per aldono de hiperligo al tiu aparta kolekto. (La disponigo de tiuj materialoj estas teknike pli facila, ja ili konsistas ĉefe nur el tekstoj kaj bildoj). Se vi akceptas la defion zorgi pri iu el tiuj branĉoj, bv. kontakti nin!

La materialojn ni disponigas en formato, kiuj unuflanke estas vaste uzeblaj (html kaj pdf), aliflanke postulas ne tro da laboro (por esti operativa kaj ne perdi tro da tempo) - kiel ekzemple la formato *.doc.

Por matematikaj kaj fizikaj verkoj ni preferas la disponigon en formato PDF, produktata ĉu per la programo Tex ĉu per Ventura (ambaŭ ili interne deponas la ekvaciojn en formo de tekstoj).

Ni invitas vin kunlabori

Ni tre dankas, se vi aktive kunlaboros en la projekto. Ni invitas vin esti "ĉasisto" aŭ "faka respondeculo" aŭ fojfoje helpi en iu konkreta tasko, aŭ helpi per alia maniero.

La "ĉasistoj" vagadas en interreto, serĉadas diversajn Esperantajn fakajn materialojn - kaj informas la fakajn respondeculojn (aŭ nin) pri trovita nova materialo. La faka respondeculo (aŭ ni) kontrolas la retejon, kaj al tiu materialo ni aldonos hiperligon en STEB.

La "faka respondeculo" klopodas plenumi la bretojn de STEB per materialoj de sia fako.

Li celkonscie serĉadas materialojn en interreto en sia fako;

kontrolas la informojn de "ĉasistoj";

instigas homojn re-disponigi (skani aŭ tajpi) artikolojn, eldonaĵojn de sia fako, kaj organizas tiun agadon;

helpas al ni en korektado de tiuj manuskriptoj en sia fako (skanitaj aŭ entajpitaj) - kiuj estis alsenditaj al ni;

laŭ kapablo eble li povas ankaŭ transformi la tekstojn al la formato html (sed tiu agado estas ne nepre, nur ebla).

Kompreneble estas granda helpo por ni, se vi prenas nur iujn certajn taskojn

de la faka respondeculo, ekzemple helpi en la retajpado de malnovaj tekstoj aŭ provlegi kaj korektadi ilin.


Laŭ la ĝisnunaj spertoj bedaŭrinde tre granda parto de malnovaj eldonaĵoj pro ilia malbona kvalito estas ne-skaneblaj, sed oni devas retajpi ilin. Tre ofte ili estis multoblitaj fotokopiaĵoj de tajp-maŝine skribitaj tekstoj. Estas tre bonvena la helpo kaj ĉe la retajpado kaj ĉe la provlegado, korektado de tiuj tekstoj.

Por atingi la nunan staton de STEB ni elspezis jam multajn centojn de laborhoroj. Tamen estas evidente, ke se ni volas serioze realigi tiun projekton, perspektive tiu laboro bezonos iun konstantan kunordiganton, kiu duon- aŭ plentempe laboros nur por tiu tasko. La teknikan bazon certigis kaj certigos la E-centro Eventoj, sed ni estos dankaj, se vi kontribuos finance al la elspezoj, kostoj de la projekto.

Jam malfermitaj dosierujoj (fakoj)

Estas jam kelkaj dosierujoj, en kiuj jam troviĝas fakaj materialoj. Ili estas:

- Vortaroj, terminaroj;
- Agrokulturo;
- Astronomio;
- Biologio;
- Ekonomio, komerco;
- Fiziko;
- Ĝeneralaj sciencoj;
- Inĝenieraj sciencoj - tekniko, mekaniko, elektrotekniko, elektroniko;
- Juro;
- Kemio;
- Kibernetiko, komputilaj aferoj;
- Matematiko;
- Medicino;
- Zoologio;
- Ceteraj, ankoraŭ ne kategoriitaj.



Terminologia laboro

Nia plej populara, plej vasta kaj plej ĝenerale uzebla dosierujo estas "Vortaroj, terminaroj". Jen nuna stato de tiu ĉi dosiero (Ĝi daŭre kreskos!):

- Reta Vortaro - La "Reta Vortaro enhavas apartajn fakvortarojn en plurdekoj de fakoj, momente la plej granda kaj valora projekto por fakaj terminoj. Lige al ĉiuj fakoj indas komence viziti ĝin;
- Terminoj pri argilaĵoj;
- Astronomia Terminaro;
- Astronomia fakvortaro Esp-franca;

- Astronomia fakvortaro franca-esp;
- Bakado kaj kukobakado (en la projekto Vo-Ko);
- Besto-nomoj - provizora privata listo pri mamuloj kaj insektoj;
- Betono kaj betonistaj laboroj, UDK 666.972:001.4;
- Biciklo - vortolisto pri muntpecoj;
- Birdoj;
- Komunlingvaj nomoj de Europaj birdoj;
- Birdonomoj en Esperanto por Hejma Vortaro;
- 16-lingva intertraduka programo, kun bildoj;
- Birdoj de Svedio en 17 lingvoj;
- Birdovortaro dana-latina-esperanta;
- Botaniko;
- Fiziko - Fakvortaro pri fiziko. Esperanta-portugala;
- Forsto - Forstista fakvortaro, "Lexicon silvestre";
- Goo - terminaro - 1;
- Goo - terminaro - 2;
- Goo - redaktejo pri terminaro;
- Insektoj - provizora listo pri nomoj de insektoj. - Wouter F. Pilger;
- Jura Vortaro Esperanta-ĉeĥa;
- Kemio - la perioda sistemo de la elementoj;
- Komputado, komputiloj, interreto:
 - Komputika Leksikono de Sergej Pokrovskij;
 - Komputika Leksikono de Sergej Pokrovskij (red. 24.);
 - Komputilaj esprimoj en PIV2 (Edmund Grimley-Evans);
 - Komputada Baza Terminaro de Kalckhoff kaj Pick (München, 1985). eo/en;
- listo de bazaj komputilaj fakvortoj de Martin Weichert;
- komputila vortaro eo/en/fr kun LEGUMIN-dosiero;
- La signoj de Askio (ASCII) de Edmund Grimley Evans;
- Nomoj de kromsignoj de Edmund Grimley Evans;
- Signo-kodoj laŭ ISO 8859;
- Kvarlingva terminaro pri Interreto;
- Terminoj kaj helpiloj;
- Interretaj terminoj + mallongaj klarigoj;
- Angla-Esperanta - vortolisto pri komputilaj aferoj.
- Konstruado - Terminologia retejo de komisiono de TAKE;

daŭrigo sur p. 4.

FAKA LITERATURO EN ESPERANTO: S.T.E.B!

daŭrigo de p. 3.

- Legomoj - nomoj por legomoj manĝataj en Nord-Okcidenta Eŭropo . -Wouter F. Pilger;
- Maristoj, ŝipoj;
- Matematika vortaro de Jan Werner: Esperanta-ĉeĥa-germana. 3800 esprimoj, eldonita en 1990.;
- Meteologia Terminaro - alia;
- Montgrimado kaj montmigrado (en la projekto Vo-Ko);
- Muzika terminaro en Esperanto (roko kaj popo);
- Plantoj - Listo de komunlingvaj nomoj de plantoj de Nord-Okcidenta Eŭropo. - Wouter F. Pilger;
- Potoj - Plurlingva vortaro pri potaj kaj potistaj vortoj - (en formato "RTF");
- Spicoj - [en STEB];
- Ŝako;
- Vo-Ko - Vortaroj kaj komputiko;
- Terminologia Komisiono de TAKE (Asocio de konstruistoj-esperantistoj) + betona terminaro;
- Teknika Vortaro ĉeĥa-Esperanta;
- Ventolado Terminareto pri ventolado en konstruaĵoj (ĉe TAKE-TK);
- Hiba! A hiperhivatkozás érvénytelen. Terminareto pri vitokultivado (ĉe TAKE-TK).

Ceteraj:

- Filozofio;
- "Fundamentaj" vortoj;
- Genealogio - plurlingva genealogia vortaro;
- Landoj de la mondo (enciklopedieto el LA JARO);
- Landoj kaj lingvoj de la mondo;
- Naturkuracado diversspeca - Leksikono pri terminoj de divers-speca naturkuracado ("Nova Epoko");
- Naturkuracado diversspeca - Esperanta-rusa. Psikologio, inkluzive terminojn pri okultismo, precipe "sanigismo";
- Radikaro de Esperanto - La listo proponas ne nur ĉiujn radikojn el PIV, sed ankaŭ de aliaj fontoj (Miroslav Malovec);
- Baza Radikaro - Esperanto-Esperanto, ĉ. 2500 radikoj, ĉ. 25000 vortoj - ĉe Wouter F. Pilger;
- Sciencfikcio - Angla-Esperanta sciencfikcia glosaro kaj frazaro;
- Skoltado 3-lingva, 9-lingva kaj 19-lingva;
- Skriboj de la mondo;
- Slango kaj ĵargono;
- Subvencipetoj;
- Vintra Vortareto;
- Vortaro familia hejma;
- Tabua vortareto;
- Pliaj vortaroj - sekcio pri diversaj vortaroj ĉe Virtuala Esperanto-Biblioteko, VEB.

Szilvási László

Jan Werner: Betona terminaro

MODELO POR TERMINARA AGADO

Jan Werner delonge plenumas tre konscian laboron por evoluigo de la Esperanta termino-kreado kaj termin-uzado, por organizado kaj efektivigo de terminologia laboro. Konataj estas liaj Terminologia kurso, Matematika terminaro, internacia koresponda kurso de terminologio.

La laboron por krei betonistan terminaron Werner komencis praktike en 1992, kiam li dum UK en Vieno prelegis pri rilato de individuaj kaj kolektiva laboroj je terminologio. La laboron poste partoprenis ankaŭ Willi Brandenburg (Germanio), Fabien van Mook (Nederlando), Dorde Obradovic (Slovenio), Josef Trojan (Ĉeĥio), kontrole: Claude



Longue-Epee (Francio) kaj Bronislav Ĉupin (Rusio).

En la jaro 2002 iĝis preta jam matura (esence dua, sed plu provizora, publike testota) versio de la verko "Terminaro de betono kaj de betonistaj laboroj" baze en Esperanto, kun ekvivalentoj en la lingvoj angla, germana, ĉeĥa.

La 40-paĝa terminaro aperis en urbo Brno.

Ĝi enhavas 225 terminojn, kun esperantlingvaj difinoj de ĉiu el la nocioj kaj kun po tri alilingvaj ekvivalentoj.

Elektronika versio estos legebla en STEB ĉe www.eventoj.hu ekde januaro.

laŭ Interredaktore

INTERRETO

LOUDU EN ESPERANTO

Mihail Povorin kreis en mia TTT-ejo novan rubrikon: ludoj en Esperanto. Mi lastatempe trovis en la reto kaj esperantigis preskaŭ dudekon da ludoj. Ili ĉiuj estas malgrandaj, simplaj, sed diversspecaj kaj ofte vere belaj. Ili povas utili por instruado, cerbotrejnadado aŭ almenaŭ por plibonigo de la humoro. Ili troviĝas ĉe: <http://mpovorin.narod.ru/ludoj/ludoj.html>

Mihail Povorin

Rete: povorin@yandex.ru

www.esperanto.net

PLI OL 30.000 VIZITOJ MONATE

Komence de junio UEA refunkciigis la retejon <http://www.esperanto.net>, kiu nun prezentas informojn pri Esperanto en 57 lingvoj (kaj la nombro kreskas). Ankaŭ la kvanto de la vizitantoj kreskas, kaj en septembro atingis 32000. Ĉe serĉado de "Esperanto", la plej grandaj serĉmaŝinoj (Google, AltaVista, Yahoo!...) montras la retejon kiel unuan.

Tommy Dahl en Danio faris retan forumon por komencantoj. Ĝi troviĝas ĉe la adreso: <http://www.egenserver.dk/phpBB2/>.

Diskutgrupo pri lecionoj pri la itala troviĝas ĉe: lecionoj@yahooogroups.com.

Konstruata retejo de Junularo Esperantista Svislanda troviĝas ĉe: <http://www.jesperanto.ch>.

Retlisto por esperantistoj, kiuj filmos antaŭ IJK en Svedio troviĝas ĉe: <http://groups.yahoo.com/group/e-filmo/>.

Esperantaj lerniloj, interalie la tuta fama romaneto "Gerda malaperis" troviĝas ĉe: <http://www.esperanto.org.br/eki/tekstoj>.

Aperis nova senpaga E-kurso per ret-poŝto por hispanlingvanoj. La kurso estas proponita de hispana retpaŝaro, kiu disponigas al siaj legantoj plurajn senpagajn kursojn, i.a. pri lingvoj. La kurso troviĝas ĉe: <http://www.mailxmail.com/Idiomas/Espananto.htm>.

RETPOŝTA NOVAĴAGENTEJO: RET-INFO

Ret-Info kolektadas novaĵojn de la Esperanto-movado kaj de ĝiaj instancoj, pri novaj servoj, pri faka aplikado, pri novaj interesaj Esperantaj retpaĝoj, ktp. - sed ne okupiĝas pri lingvaj kaj literaturaj demandoj.

Mesaĝoj de Ret-Info estas dissendataj per retpoŝto.

La mesaĝoj estas dissendataj regule, sed ne pli ol maks. 3-4 mesaĝoj tage.

La "Temo-ru-briko" de mesaĝoj ĉiam komenciĝas per la esprimo "ret-info:", do se vi havas taŭgan retpoŝtan programon, vi povas filtradi tiujn mesaĝojn, kaj kolekti ilin en aparta dosierujo.

GRAVE: La mesaĝojn de Ret-Info oni povas libere utiligi en paperaj Esperantaj gazetoj (kun indiko de la fonto), sed oni NE RAJTAS plusendi ilin sen aparta permeso al iu ajn alia interreta forumo aŭ retlisto.

Kiom kostas Ret-Info?

Vi devas kontribui al la kostoj de la servo. La kotizo estas por:

- A-landanoj: nur 19 eŭroj por 12 monatoj;
- B-landanoj: nur 10 eŭroj por 12 monatoj.

Vi povas iam ajn aliĝi al ret-info (ekz. de aprilo ĝis aprilo), do la abono ne ligiĝas al kalendara jaro!

Kiel aliĝi al Ret-Info?

Estas simple: Informu nin pri via aliĝdeziro kaj samtempe pagu la aliĝkotizon al iu peranto!

Vi povas aliĝi per la nuna reta formularo, aŭ vi povas sendi retpoŝtan mesaĝon kun via deziro al ni, indikante vian:

- retadreson;
- plenan nomon;

- adreson (minimume vian landon);
- kaj la manieron de via pago (kiam, al kiu vi pagis/-os).

La mesaĝojn de "Ret-Info" ni komencas sendadi al vi POST la ricevo de la pago (aŭ post la ricevo de la mesaĝo de via peranto).

Kiel pagi la kotizon?

La kotizon vi povas pagi:

- al nia UEA-konto: ELLS-S (nepre indiku vian retadreson!);

- al nia konto ĉe Flandra E-Ligo: LSTD-A (nepre indiku vian retadreson!);

- al niaj landaj kotizperantoj;

- vi povas sendi en simpla, fermita letero ajnan konverteblan valuton al nia poŝtadreso: pk. 87, HU-1675 Budapeŝt, Hungario;

- vi povas pagi al nia reprezentanto dum la UK aŭ IJK;

- per kreditkartoj vi povas pagi ĉe UEA kaj Flandra Esperanto-Ligo, FEL.

Vi povas aliĝi al la servo Ret-Info iam ajn, do ne nur en januaro, kaj la mesaĝojn vi ricevas en 12 monatoj.

Rilatoj al Eventoj

La novaĵagentejo "Ret-Info" estas funkciigata de la Eventoj-teamo.

La papera versio de Eventoj ĉesos en fino de 2002, sed kompreneble daŭre funkcios la novaĵagentejo Ret-Info. (La novaĵagentejo "ret-info" kaj la papera "Eventoj" estas 2 malsamaj aferoj.)

Aliĝu al la novaĵservo hodiaŭ, ja ĝi estas farata ĝuste por Vi!

Starante je via dispono:

László Szilvási
kaj la Eventoj-teamo
Rete: ret-info@eventoj.hu



MOVADO

ESPERANTO-KATEDRO EN TAĜIKIO

Ekde septembro en la Kaukazia Laika Instituto en Mahaĉkala, Respubliko Dageŝtan, Rusio, oficiale funkcias Katedro de Internacia lingvo Esperanto. La estro - Abdurahman Junusov, iama redaktoro de Eventoj. Studentoj de la fakultatoj: dizajna, religioŝcia, komputila k. a. studas E-on. Estas tre dezirindaj kaj bonvenaj la kuraĝigaj leteroj, informoj ktp.

Abdurahman Junusov
Ab/k 74, RU-367000 Mahaĉkala,
Respubliko Dageŝtan, Rusio
Rete: junusov@dagestan.ru

PROGRESO EN IRANO!

Irana Esperanto-Centro okaze de la malfermo de sia nova oficejo aranĝis specialan ceremonion la 24-an de Azar 1381 (15-an de decembro 2002) honore la naskiĝtagon de Zamenhof.

La ceremonio komenciĝis ekde 17-a kaj daŭris ĝis la 19-a horo. Okazis prelegos de d-ro Hosein Vahidi kaj d-ro Mohammad Karamudini.

Aktualaj perslingvaj informoj ĉe: <http://esperanto.persianblog.com/>.

Reza Torabi

ZAMENHOF-TAGO EN MALTO

La Malta Esperanto-Societo okazigis Zamenhof-tagon la 15-an de decembro ĉi jare per bankedo ĉe apudmara hotelo. Oni aŭskultis por la unua fojo novan himnon kun versoj de la prezidanto D-ro Carmel Mallia kaj muziko de s-ro Carmelo Borg, malta elstara muzikisto kaj direktisto. La kantatan himnon akompanis perpiane s-ro James Vella Bondin.

LaVojo
Rete: lavojo@melita.net

Plena kalendaro de Esperanto-aranĝoj ĉe:

www.eventoj.hu

Profesie agadi por la lingva egaleco

DAFYDD AP FERGUS RESPONDAS

Dafydd ap Fergus, ĝenerala sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio kaj brusela korespondanto de La Ondo de Esperanto, LOdE, estas unu el la gvidantoj de la Brusela Komunikadcentro.

LOdE: Ĉu la Brusela Komunikadcentro jam ekzistas?

DF: La Centro ekas. Grave estas ke ni plenumas niajn celojn laŭ la interkonsentoj de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kun UEA. Tio signifas starigi daŭran komunikadcentron kiu, pere de agado pri kaj por lingva egaleco ĉe internaciaj kaj naciaj organizoj, politikistoj kaj ĵurnalistoj, plibonigos kaj la publikan bildon de Esperanto kaj lingvan konscion.

LOdE: Kion fakte signifas “plibonigi la publikan bildon de Esperanto”?

DF: Mi klarigas per ekzemplo de lingva diskriminacio. Ekde du jaroj, EEU (www.lingvo.org) atentigas politikistojn kaj ĵurnalistojn pri la kreskanta nombro de dunganoncoj fare de internaciaj organizoj kaj firmaoj kiuj serĉas nur denaskajn parolantojn de la angla (“English mother tongue”). Ĉi tiu agado kontraŭ lingva diskriminacio estas vizitkarto por EEU. Ĝi ebligas al mi, kiel al oficisto de EEU, viziti politikistojn kaj eŭropajn oficistojn por pritrakti la problemon de lingva diskriminacio. EEU ankaŭ faros proponon por studprojekto pri lingva diskriminacio. Se ni ricevos la financadon, ni povos inviti junan esperantiston al Bruselo por helpi kun la studo.

LOdE: Sed kiel tiu agado kontraŭ diskriminacio rilatas al Esperanto?

DF: Lingva diskriminacio estas grava atenco kontraŭ la interna ideo de Esperanto. Politikistoj unue devu respekti la bazan principon de la lingva egaleco. Nur poste Esperanto havos ŝancojn. Nun la helpantoj de politikistoj tuj forĵetas leterojn kaj elektronikajn mesaĝojn de esperantistoj, kiuj proponas Esperanton kiel solvon. Do, ni devas unue kon-

vinki homojn pri la graveco de la lingva egaleco antaŭ ol politikistoj konscios pri Esperanto kiel ebla solvo. Kaj, plej grave, aliaj lingvaj asocioj kiel la francaj kaj germanaj, nur defendas la proprajn lingvojn kaj interesojn.

La Esperanto-komunumo defendas la bazan principon de la lingva egaleco por ĉiuj kaj ĉie.

LOdE: Ĉu la malgranda neregistara organizo, kiel Eŭropa Esperanto-Unio, kapablas devigi eŭropajn politikistojn respekti lingvajn rajtojn?

DF: Jes. Ni jam atingis rezultojn, ekzemple, rilate lingvan diskriminacion. Ministroj en Belgio, Francio kaj ankaŭ anoj de la Eŭropa Komisiono, publike konsentis kun Eŭropa Esperanto-Unio pri lingva diskriminacio kontraŭ nedenskaj parolantoj de la angla (rigardu ĉe www.lingvo.org).

Kompreneble EEU sekvas aliajn kazojn de lingva malegaleco. Ekzemple, Eŭropa Komisiono devigas preskaŭ ĉiujn landojn en orienta kaj meza Eŭropo traduki leĝojn kaj aliajn dokumentojn anglan. Poloj, ĉeĥoj aŭ slovakoj devas komuniĝi nur angle kun eŭropaj oficistoj rilate agrarajn aferojn. Ĉi jare, preskaŭ ĉiuj muzikgrupoj kantas angle ĉe la Eŭropa Kantkonkurso. Estas multaj ekzemploj de lingva malegaleco, kiujn baldaŭ EEU kapablos publike kaj profesie kritiki.

LOdE: Ĉu eblas profesie kaj publike kritiki politikistojn?

DF: Jes. Mi estas okcidenta eŭropano kaj ankoraŭ juna!

Unue, ni devas fariĝi alloga asocio: malgranda kaj modesta speco de lingva Greenpeace aŭ Amnesty International, kiun normalaj homoj finance kaj morale subtenas. Por atingi tiun celon, ni unue konstruas kaj plibonigas la organizan strukturon de EEU. Ĝi, ekzemple, baldaŭ kapablos dissendi gazetarajn komunikojn kun klaraj starpunktoj kaj ankaŭ produkti neŭtralajn informojn pri lingvaj problemoj.

Kompreneble, la agado estos ĉefe bazita sur la laboro de esperantistaj volontuloj kaj kunlaborantoj. Tamen ĝi estas profesia “produkto”. La rezultoj estos tre baldaŭ videblaj pere de nia retejo. Ankaŭ mi esperas ke la rezultoj estos baldaŭ videblaj dank’ al artikoloj en nacilingvaj ĵurnaloj.

LOdE: Kiajn konkretajn paŝojn faros la Komunikadcentro en la venontaj monatoj?

DF: Ni baldaŭ luos ejon en Bruselo, ne malproksime de la eŭropaj instancoj. Dum la lastaj kvar monatoj, krom miaj vizitoj ĉe politikistoj, mi ĉefe laboras en la Eŭropa Parlamento kaj hejme, pere de la interreto, kun E-kunlaborantoj. Nun ni havas plian financadon, aldone al la baza sumo de 36 000 eŭroj por 2002, kiu ebligas la

Komunikadcentron finance subteni junan praktikanton. Kaj kunlaboranto nun neprigas, kompreneble, la luadon de oficejo.

La financa situacio de la Komunikadcentro estas garantiita por la venontaj du jaroj. Tio donas tem-

pon serĉi aliajn financfontojn, ĉu ĉe Eŭropa Komisiono, ĉu ĉe privataj organizoj, firmaoj kaj homoj. La sumo de 36 000 eŭroj por 2002 ne estas multe en la okcidenteŭropa urbo Bruselo, post la impostoj, luo de oficejo, kaj ĉiuj aliaj elspezoj.

LOdE: Kiujn problemojn vi jam havas?

DF: Estas tro da laboro! Mi devas komenci ekde nulo. Ankoraŭ mankas bonaj adresaroj de ĵurnalistoj kaj politikistoj. EEU ankoraŭ konstruas reton de kunlaborantoj. Ni devos baldaŭ elekti kunlaboranton, lui oficejon, aĉeti plian komputilon, ktp. Esperantaj asocioj antaŭe ne multe okupiĝis, en profesia maniero, pri lingva politiko en alloga kaj “normala” maniero por ĵurnalistoj.

Kaj la espero de esperantistoj estas ege altaj!

*Intervjuis Aleksander Korĵenkov
La Ondo de Esperanto. 2002/4 (90)
fonto: <http://ttt.esperanto.org/Ondo/>*



INSTRUADO, ILEI

INSTRUMATERIALOJ EN ESPERANTO

La fama instituto Massaĉussets Institute of Teĉnology, MIT, Boston, Usono, ekas disponigi elektronike per la reto sian instrumaterialon.

Videblas "Open Course Ware" (malfermita kursmaterialo), kiu sekvas la filozofion de liberaj pro-

gramoj, liberigante la uzadon por ke ĝi servu profiton de multaj personoj, kaj por ke ĝi kresku per aldonado de materialoj.

Unu el la ebloj estas, kompreneble, ĝia traduko. Se oni volas traduki ĝin, ekzemple al Esperanto, oni povas uzi ĝin libere.

Momente ankoraŭ ne estas tre multaj materialoj tie, sed la ideo estas havi tie la tutan materialo de MIT, inkluzivante eĉ kelkajn vidfilmojn.

Jozefo Lunazzi

BAZA ESPERANTA RADIKARO

Antaŭ ne longe aperis utila libro por esperantistoj, Baza Esperanta radikaro de Wouter F. Pilger. La radikaro enhavas pli ol 2700 radikojn, kiujn ĝi klarigas per kutimaj kaj elementaj Esperantaj vortoj. Ĝi estas aparte utila por tiuj, kiuj ne havas Esperanto-vortaron en sia

propra lingvo, aŭ la vortaro estas ne sufiĉe ampleksa, sed ĝi estas rekomendinda al ĉiu ajn, kiu helpe de Esperanta-Esperanta vortaro volas lerni, pensi senpere en Esperanto.

La libron eldonis Universala Esperanto Asocio. Ĝi mendeblas ĉe:

*Libroservo de UEA
Niuwe Binnenweg 170.
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Rete: libroservo@co.uea.org*

GAZETOJ

REVUO ESPERANTO: ANKAŬ EN ELEKTRONIKA VERSIO!

Ekde la januara numero revuo Esperanto estos presata en Slovakio -pli rapide, pli malmultekoste kaj eĉ iom pli kvalite ol antaŭe.

Tio interalie signifas, ke Stano Marček, la redaktoro de la revuo, ekde nun estos prizorganta ĝian preparadon de la kolektado de la informoj ĝis la enpoŝtigo. Nur la provlegado okazos, kiel antaŭe, en Roterdamo.

Alia novaĵo pri la revuo estas, ke en

la nova jaro ĉiu membro-abonanto de UEA rajtos mendi aldone al la papera revuo ankaŭ ĝian elektronikan version - kiu povas esti en la formatoj PDF, simpla teksto aŭ HTML. La elektronika versio estos liverata tuj post la finredakto de ĉiu numero kaj tiel atingados la membrojn je unu-du semajnoj pli frue. Por mendi la elektronikan version oni skribu al reto@uea.org, indikante sian UEA-kodon.

Ekperimente la elektronika versio estas abonebla ankaŭ por nemembroj, sed nur se ili loĝas en B-landoj. La kosto de la servo por ili estas fiksita kiel duonigita B-landa abonkotizo: 7,50 euroj. La abonojn akceptas UEA-perantoj en ĉiuj landoj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, 161

perantoforlaget, Oslo, 2001. 34 p.

Malgranda gvidlibro pri Moskvo. Nikolao Gudskov, Natalia Aroloviĉ. Eld.: Impeto, Moskvo, 2000. 90 p.

La bluoj modrine. Vesna Parun. Eld.: Internacia Kultura Servo, Zagreb, 1999. 146 p.

Pulsas la viv'. Lucija Borĉiĉ. Eld.: Internacia Kultura Servo, Zagreb, 2001. 130 p.

Leon'-vilaĝo. Tibor Kristály. Eld.: Tibor Kristály, 2000. 12 p.

NI MENCIAS

La lastaj tagoj de Ada, Aduŝka. Eld.: G. C. Fighiera, Torino, 2002. 26 p.

Je diversa temo - intervjuoj de Dimitar Haĝiev kun la veterano de la E-movado. Nikola Alekiev. Eld.: Venelin Mitev, Sofio, 2002. 26 p.

Esperanto ABC. Jon Rommesmo. Eld.: Es-

ORGANIZAJ DEMANDOJ

MEMBRO-MEMBRON!

Se ĉiu el ni akirus nur unu novan membron, UEA kaj TEJO duobliĝus. Multaj esperantistoj membriĝus en UEA / TEJO, se iu proponus tion al ili!

La kampanjo Membro-Membron! - estas samtempe konkurso. Ĝi daŭros ĝis la fino de januaro 2003.

Ĉiu membro de UEA kaj TEJO, kiu akirus novan individuon membron (en ajna kategorio), ricevos libropremion kaj lia nomo aperos en la Revuo Esperanto.

Unu konkursanto (decidos loto) ricevos la novan Plenon Ilustritan Vortaron de Esperanto.

Ekzempleron de la nova PIV ricevos ankaŭ membro, kiu akirus la plej multajn novajn membrojn.

La lotumado okazos la 10-an de februaro 2003.

La rezulto aperos en la marta numero de la revuo.

La kondiĉoj: bonvolu rete aŭ skribe informi la redaktoron (Stano Marcek, revuo@uea.org) ke vi akirus novan membron:

- skribu vian nomon;
- vian UEA-kodon;
- la nomon kaj la adreson de la (de vi akirita) nova membro.

Post alveno de la kotizo (eblas ankaŭ donaci ĝin!) vi eniros la konkurson.

Helpu ankaŭ vi vastigi nian komunumon!

LIBROJ

VESPERMANĜOJ

La libro estas kolektaĵo de retmesaĝoj senditaj de Zoran Ćiric al amikoj dum la NATO-atako al Jugoslavio en 1999. Ĝi rakontas pri la travivaĵoj de juna e-isto dum militaj kondiĉoj. Persona, originala atesto de junulo, kiu per malfermitaj okuloj rigardas la mondon, kaj politikon, kaj plu - malgraŭ la bomboj - esperas kaj laboras por paco kaj por la Tero. Aldone aperas en la verko kronologio pri la bombado kaj oficialaj interkonsentoj pri la transpreno de Kosovo fare de UN. La 68 paĝa libro mendeblas kontraŭ 6 EUR de:

*Flandra Esperanto-Ligo
Framkrijklei 140.*

*BE-2000 Antwerpen, Belgio
Rete: retbutiko@fel.esperanto.be*

KORESPONDADO

21 j. fraŭlino, studento pri historio. Adreso: Dominique Vieira, Rua H-96 quadra 167 lote 18b, Cidade Vera Cruz Ap. de Goieônia-go BR-74936-490 Brazilio, rete: guardiaodportal2@bol.com.br.

21 j. komencanto. Intereso: teatro, muziko, legi, lingvoj, historio, lernejo. Adreso: Erik Winsor, 625 W. 27th Ave. Kennewick, WA-99337 Usono, rete: Vampyre625@aol.com.

"EVENTA LUDKVIZO"

Ĝustaj respondoj al la demandoj aperintaj en n-ro 240.

1. De kiam oni povas uzi Esperanton kiel lingvon de sendata telegramo?

C. Ekde 1925

2. Kiam oni aldonis la unuan fojon poŝtmarkon kun Esperanto-teksto en Sovetio?

A. En 1925

3. Kion signifas la mallongigo SES?

A. Spirita Eldona Societo

Ĝustaj respondoj al la demandoj aperintaj en n-ro 241

1. De kiam oni povas uzi Esperanton kiel lingvon por sendi leteron al Avo Frost?

C. Ekde 2002

2. Kiam okazis la unu konferenco pri instruado de Esperanto, kiun iniciatis la Instituto J. J. Rousseau?

B. En 1922

3. Kion signifas la mallongigo TOLE?

B. Tutmonda Ortodoksa Ligo Esperantista

Ni dankas vin, ke vi kunludis!

ESPERANTO ANTAŬ LA FRANCA!

En perfektiga kunveno por ekzamenantoj - la 23-an de novembro 2002 - reprezentanto de ITK (Perfektiga Centro Fremdlingva) raportis pri la stato de ekzamenitoj pri lingvoj en la jaro 2002.

Ekzamenitaj estis 154.000 personoj pri 20 akredititaj lingvoj en 73 ekzamenejoj de 28 urboj en Hungario: en la gradoj supera (5%), meza (70%) kaj baza (25%). La plej altnombre elektitaj lingvoj estis la angla (53,1%), la germana (33,8%), la ceteraj (13,1%).

La promiloj (!) de Esperanto 11-obligis dum la lastaj kvin jaroj:

- en 1998 - 0,4;

- en 1999 - 0,6;

- en 2000 - 1,4;

- en 2001 - 2,3;

- en 2002 - 4,6.

Per tiu ĉi sukceso nia Lingvo Internacia, nun en la tria loko, estas antaŭ la franca lingvo!

En la jaro 2002 sume iom pli ol 7000 personoj enskribiĝis por ŝtate rekonitaj lingvoekzamenoj pri Esperanto (ni ne forsilentu: kun 59 % - a sukceso la unuan fojon).

La E-instruado en Hungario - kompreneble - havas ankoraŭ multe da problemoj, tamen ni diru kun ioma fiero, ke tiu ĉi jaro estis sukcesa por nia E-movado. Estu gratulataj tiuj, kiuj kontribuis al tio.

Tibor Papp

GRAVECO DE LA MANĜAĴOJ EN NIA VIVO

La japanoj manĝas tre malmulte da graso kaj suferas je malpli da korinfarktoj ol britoj kaj usonanoj.

Male, la francoj manĝas multe da graso kaj same suferas je malpli da korinfarktoj ol la britoj kaj usonanoj.

La japanoj trinkas tre malmulte da ruĝa vino kaj suferas je malpli da

INTERESE

korinfarktoj ol la britoj kaj usonanoj.

La italoj trinkas ekscesan kvanton de ruĝa vino kaj same suferas je

malpli da korinfarktoj ol la britoj kaj usonanoj.

Konkludo: manĝu kaj trinku kion ajn vi volas; la mortiga faktoro estas paroli la anglan.

DIFERENCO INTER MONDPARTOJ

En UN oni decidis okazigi tutmondan opini-enketadon, kaj prezenti al multaj personoj la jenan demandon:

"Bonvolu esprimi vian sinceran opinion pri la ebla solvo pri la manko de nutraĵoj en la cetera mondo."

La esploro komplete malsukcesis ĉar:

en Afriko oni ne sciis kio estas "nutraĵoj".

en okcidenta Eŭropo oni ne sciis kio estas "manko".

en orienta Eŭropo oni ne sciis kio estas "opinio".

en centra Ameriko oni ne sciis kio estas "bonvolu".

en orienta Azio oni ne sciis kio estas "sincera".

en Usono oni ne sciis kio estas la "cetera mondo".

Kaj...

en la Mezoriento oni ne sciis kio estas "solvo"...

EVENTOJ, Nyt. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X
A szerkesztőség címe: HU-1675 Budapest, pf. 87.
Tel./fax: 282-88-85. E-posta: redaktor@eventoj.hu
<http://www.eventoj.hu/>
Megjelenik kéthetente. Nyomás: SZEL-KER Nyomda Kft.
HU-1149 Bp, Fogarasi u. 17/A
EVENTOJ, internacia gazeto pri la Esperanto-movado,
en kunlaboraj rilatoj al Hungara E-Asocio.
Eldonas LINGVO-Studio. Redaktas: Axel Ország-Krysz
Oficeja kunlaboranto: István Mészáros.
Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro: László Szilvási.
La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj
artikoloj, kaj ne respondas pri la anonc-enhavo.
Abonkoto: 34, aere 40 EUR al la UEA-kodo ELLS-S.

Adiaŭ! (aŭ Ĝis Revido!?)